



7-a INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO  
7-a EŬROPA ESPERANTO-FORUMO  
56-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

VALENCIA (HISPANIO) 8-13 Julio 1997



7-a INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO  
7-a EŬROPA ESPERANTO-FORUMO  
56-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

VALENCIA (HISPANIO) 8-13 Julio 1997

**KONGRESEJO: Fakultato pri Filologio**  
**Avenuo Blasco Ibañez, 30 - VALENCIA**

**Redaktoro: José Pérez Sempere**  
**Presas: Studio Puig, Planas 12 - VALENCIA**



S. M. SOFIA, Reĝino de Hispanio  
Honora Prezidanto

*Sofia R.*

# SALUTON AL LA GEKONGRESANOJ

Jen ni denove, en Valencio, okaze de internacia Esperanto-aranĝo. Mi ankoraŭ rememoras la Universalan Kongreson de UEA, kiu okazis en Valencio en 1993, kaj kiu, laŭ opinio de multaj partoprenintoj, estis unu el la plej agrablaj kaj sukcesaj en multaj jaroj.

Ĉi jare okazas en Valencio la “7-a Internacia Esperanto-Kongreso”, la “7-a Eŭropa Esperanto-Forumo”, kaj la “56-a Hispana Esperanto-Kongreso”. Ene de tiuj aranĝoj ni povos ĝui prelegojn de la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj, artajn prezentadojn de artistoj alvenintaj el diversaj landoj, kaj ĉefe, kio estas nia celo, ni havos la plezuron denove rekontiĝi kun amikoj el multaj landoj, babiladi surkoridore, promenadi tra la belaj stratoj kaj parkoj de la urbo, sunbruniĝi en la valencia maro, ĉeesti la multajn artajn kaj kulturajn aranĝojn kiujn Valencio oferas al la vizitantoj ĉiujare dum la “Julia Foiro”, kaj, kompreneble, praktiki kaj perfektigi nian nivelon de Esperanto.

Ni varme invitas vin ĝui dum via restado tion, sed nia ĉefa celo estas atingi en ĉiu kongresano belan rememoron de la restado inter ni, kaj sukcesi krei en ili deziron denove viziti Valencion.



Augusto Casquero de la Cruz  
Kongresa Kunordiganto

## DANKON!

Al personoj kaj instancoj kiuj kontribuis al la sukceso de la Kongresoj:

- Fakultato pri Filologio.
- Urbestraro de Valencio.
- Urbestraro de Cheste.
- Konsilantaro pri Kulturo, Edukado kaj Scienco.
- Magazeno “El Corte Inglés”.
- Turismo de la Valencia Generalitato.
- TurismoValencia Convention Bureau.
- Salvador Lafuente Sastre.

# OFICIALA PROGRAMO

## LUNDO, 7-a de JULIO

17.00 Estrarkunveno de HEF, en Grupo Esperanto de Valencia.

## MARDO, 8-a de JULIO

09.00 Kunveno de la membraro de HALE.

10.00 ĝis 14.00, kaj 16.00 ĝis 19.00 Disdonado de la kongresa dokumentaro.

11.00 Malfermo de LIBROSERVO.

11.00 Malfermo de la FILATELA EKSPOSICIO.

11.30 Estrarkunveno de HEF.

12.30 Gazetara konferenco.

14.00 Manĝo-paŭzo.

16.00 - 18.00 Kurso de E-o laŭ Cseh-metodo (Anton Zacharias, Slovakio).

16.00 Estrarkunveno de Monda Turismo.

17.00 Debato: "LA LINGVOJ DE HISPANIO". Kurordiganto Antonio Alonso, HEF-Prezidanto.

18.30 Interkona Vespero.

20.00 Arta Vespero.

## MERKREDO, 9-a de JULIO

09.00 Malfermo de LIBROSERVO.

10.00 Solena MALFERMO de la Kongreso.

11.00 Festparolado: "SUR LA VOJO AL UNUECA EŬROPO: PROBLEMOJ KAJ DEFIOJ". Doktorino Rafaela Uruĉia.

12.00 Prezento de filmo en Esperanto.

13.30 Akcepto ĉe Urbodomo por la delegitoj kaj e-aj reprezentantoj.

14.00 Manĝo-paŭzo.

16.00 - 20.00 Poŝta kongresa stampado.

16.00 - 18.00 Kurso de E-o laŭ Cseh-metodo.

16.00 Prelego: "ESPERANTO PRETER LA JARO 2000 (LINGVO KAJ MOVADO)". Gian Carlo Fighiera (Italio).

17.00 Kunveno de la partoprenontoj en la Pilgrimado al Santiago de Compostela. Prelego kun lumbildoj. Augusto Casquero (Hispanio).

18.00 Ronda tablo de la Eŭropa Esperanto-Forumo.

18.00 Kunveno de HEF-delegitoj.

19.30 Teatro en Esperanto.

## **JAŬDO, 10-a de JULIO**

- 09.00 Eliro de la ekskursoj, antaŭ la kongresejo.
- 09.00 Malfermo de LIBROSERVO.
- 09.30 Prelego kun kolokvo: "INSTRUADO DE ESPERANTO LAŬ CSEH-METODO". Anton Zacharias.
- 10.30 Prelego kun kolokvo: "ESPERANTO EN RADIO". Barbara Pietrzak, redaktoro de Pola Radio.
- 11.30 Praktika prezentado: "JAPANA TERAPIA MASAĜO YUMAIKO". Sigita Stasiunaite (Litovio).
- 12.30 Muzika Prezentado.
- 14.00 Manĝo-paŭzo.
- 16.00 Kurso de E-o laŭ Cseh-metodo.
- 16.00 Prelego: "LA MUZIKO DE FERNANDO SOR". Jesús de las Heras (Hispanio). Kun gitaro.
- 17.30 Prelego pri Esperanto por ĝenerala publiko.
- 17.30 Prelego: "MIKOLOGIO KAJ FUNGOKOLEKTADO EN CENTRA EŬROPO", kun lumbildoj. Milan Zvara (Slovakio).
- 19.00 Internacia Arta Vespero.
- 20.00 Hispana Vespero.
- 22.00 Nokta perpieda rigardado al la urbo.

## **VENDREDO, 11-a de JULIO**

- 09.00 Eliroj de la ekskursoj, antaŭ la kongresejo.
- 09.00 Malfermo de LIBROSERVO.
- 09.30 Kunveno kun la profesorado de la Fakultato pri Filologio.
- 10.00 Prelego: "SUR LA SPUROJ DE FEDERICO GARCÍA LORCA". Miguel Fernández (Hispanio).
- 11.30 Prelego: "INTERNACIA ESPERANTO-TURISMO". Andrzej Grebowski, prezidanto de M.T.
- 12.30 Prezentado de venontaj E-kongresoj (inter ili UK-oj de Adelaido kaj Montpellier, 8-a Internacia Esperanto-Kongreso, 57-a Hispana Kongreso de Esperanto, ktp).
- 12.30 Praktika prezentado de E-o en Internet: "HEF-PAĜARO". Marcos Cruz (Hispanio).
- 14.00 Manĝo-paŭzo.
- 16.00 Kurso de E-o laŭ Cseh-metodo.
- 17.00 Omaĝoj al Ada Fighiera. Juan Carlos Ruiz kaj Fernando de Diego.
- 20.00 Prelego: "METODOLOGIOJ PRI MULTIMEDIA INFORMATIKO". M. A. Sancho (Hispanio).

## **SABATO, 12-a de JULIO**


(LA TUTTAGA PROGRAMO OKAZOS EN LA VILAĜO CHESTE)

- 09.00 Eliro de la aŭtobusoj kun la kongresanoj al la vilaĝo Cheste.
- 10.00 Katolika Diservo (ne-oficiala programero).
- 11.30 Publika prelego.
- 12.30 Arta Prezentado.
- 14.00 GIGANTA PAELLA.
- 16.30 Kurso laŭ Cseh-metodo.
- 16.30 Ibere Libere: "DE VALENCIO AL VALENCIO" (Jorge Camacho, Miguel Fernández, Abel Montagut, Miguel Gutiérrez Adúriz, Gonçalo Neves, Antonio Valén).
- 18.30 INTERNACIA ARTA FESTIVALO. Disdonado de la literatura premio "FRANCISCO MÁÑEZ".
- 21.00 Reveno de la aŭtobusoj al Valencio.

## **DIMANĈO, 13-a de JULIO**

- 09.00 Eliroj de la ekskursoj.
- 09.30 Prezentado de novaj libroj.
- 09.30 Kurso laŭ Cseh-metodo.
- 10.30 ĜENERALA KUNVENO DE HEF.
- 12.00 Ferma prelego. Premio "KLARA SILBERNIK". 50-a Datreveno de la fondiĝo de HEF.
- 13.00 Arta prezentado.
- 14.00 Komuna adiaŭa tagmanĝo, kaj fermo de la kongreso.

## **78-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**



**VALENCIO 24-31 JULIO 1993**


## ROMIANOJ, ARABOJ, RIZO KAJ FAJRO

Kvankam poeto povus diri, imitante la stilon de helenaj mitoj, ke ĝi naskiĝis el la ŝaŭmantaj ondoj de la blua Mediteraneo, por esti nesto de laborema kaj revema popolo, Valencio estis fakte fondita de la soldatoj de lusitana generalo Viriato, kiam la legioj de Romo klopodis trudi sian hegemonion sur ĉiujn angulojn de la ibera duoninsulo.

Valencio tamen, komencis akiri gravecon nur dum la araba regado, kun siaj propaj emiroj. La militisto Cid konkeris la urbon; sed, tuj post lia morto, la araboj denove prenis kaj konservis ĝin, ankoraŭ cent jaroj pli, ĝis definitive ĝin akiris la reĝo Jakobo 1-a la Konkeranto (9 oktobro 1238).

De post tiam, Valencio – kun aŭtonomaj institucioj kaj leĝoj – estis gvida ĉefurbo de tre grava regno, rekte kunligita al la Aragona Konfederacio, kiel sendependa membro, kies komerca famo daŭre kreskis ekde la 14-a jarcento.


En la antikva parto de la urbo ripozas nobelaj domoj, kun sinjoraj



kortoj, kiuj elvokas la lastajn jarcentojn de la mezepoko; oni eniras en ĉi tiun kvartalon tra du belaj pordegoj, flankitaj per turoj el la 14-a kaj 15-a jarcentoj; la unua, nomata de *Serranos*, certe estas la plej belaspekta inter ĉiuj aliaj, el simila speco, troviĝantaj en Hispanio; la dua, nomata de *Cuarte*, imponas pro sia grandiozeco.

Kiel natura kompenso al sia vigla laboremo, la valencia popolo estas treege amuziĝema; spritaj festoj kaj sanaj distroj, adekvataj al ĉiu sezono de la jaro, sekvas unu la alian preskaŭ





seninterompe. Sed, kelkaj el ili superas la limojn de plej ekstrema fantazio.

Tre originala estas la festo de la Fajro, okaze de Sankta Jozefo (12-19 Marto) tiam oni starigas grandajn monu-mentojn el kartono kaj ligno, kun burleskaj figuroj kaj satiraj scenoj, plenaj de bona humoro, kiuj post tri tagnoktoj, en rolo de publika pilorio, apoteoze brulas meze de blindiga lumo kaj bruanta eksplodo de arto-fajraĵoj.

Bonegaj strandoj etendiĝas ĝis la *Albufera*, granda lago el dolĉa akvo, sur kies

likva kristalo, kvazaŭ bildo el japana pejzaĝo, sin reflektas flugantaj anasoj kaj fulikoj, najbare de senfina ebenaĵo el verdaj rizkampoj, fenditaj de multaj kanaloj, apud kiuj lumas la blankaj dometoj de la kamparanoj. En alia direkto oni povas eniri en la paradizon de la oranĝarbaroj, kie intensa aromo, en la epoko de la florado, volupte ensorĉas la aeron, levas la animon kaj delogas la spiriton...

... Kvankam malpli poezie, sed pli pozitive por sperti alian specon de sorĉo, oni povas – eĉ en tute modesta hejmo! – ĝui la plezuron de pantagruela festeno, se oni funde gustumas la tipan manĝaĵon *paella*, zorge kuirita rizo kun legomoj kaj kokida viando, kies harmonia kombino estas same agrabla por la okuloj, por la palato kaj... por la stomako!.

Nu, sciante krome, ke ĝentila gastameco, sen falsaj rebriloj, estas natura kvalito de Valencio, ne forgesu do ĝian nomon, okaze de planita vojaĝo, ĉar tiu popolo atendas vian viziton, en kiu ajn tago de la jaro, por amike vin akcepti kun larĝe malfermitaj brakoj kaj ĝoja rideto ĉe la lipoj.

## IOMETE PRI LA PASINTECO

Ĉio komencis en modesta ĉelo de ordino “escolapios” de Valencio. Kortuŝitaj pro la nova lingvo kiu postulas la komprenado inter ĉiuj la homoj, tie kunvenis kun pastro Guinart, pluraj militistoj: subkolonelo Ramón Ayzá, kapitanoj Vicente Inglada kaj Rafael Duyos kaj ŝipleŭtenanto Augusto Giménez Loira.

Ekis la jarcento, kaj tre efika devus esti la laboro de tiu malgranda teamo, ĉar malmultaj jaroj poste estis jam tuta Valencio kiu ekzaltiĝis per Esperanto.

Fakte en la jaro 1909, okazis la Regiona Ekspozicio kaj Esperanto havis tie sian lokon en ĉambro de 20 m<sup>2</sup>. Sed la 19-a septembro D-ro. Zamenhof atingis Valencion. Ĉe la stacidomo atendis lin multaj aŭtoritatuloj, inter ili la tuta urbestro kun madzuloj, rajdanta policaro kaj urba muzikistaro kiu ludis la himnon “La Espero”.

La emocio de la gento estis tiel granda, ke kiam D-ro. Zamenhof izoliĝis en ĉambroj rezervitaj en Hotelo Palace de la strato La Paz, ili aklamis lin tiel forte ke li devis foriri al la balkono, flankita per du grandaj, muraj, floraj tapizoj en kiu oni povis legi: “Vivu Esperanto,

Vivu D-ro. Zamenhof”.

Tamen ne ĉio estis floroj por la evolucio de Esperanto en Valencio ĉar venis tempoj de silento kaj malplimulto, sed la kunigo Esperanto-Valencio daŭras ĉiam, ĝis hodiaŭ.


Valencio ĉefe elstaris en tia celo: ne limigi sian esperantistan agon al la urbo, sed klopodis disvastigi Esperanton tra tuta Hispanio. Tiel Valencio estis seĝo de la unua Hispana Esperantista Asocio. En Valencio oni eldonis la revuon “La Suno Hispana” organo dum multaj jaroj de



GRUPA EMBLEMO EL 1812

hispana esperantistaro. En Valencio aperis la tiam plej taŭga gramatiko kaj la ĝis nun plej kompleta vortaro por lerni kastilie esperanton: la gramatiko de Soler kaj la vortaro de Tudela.

Ankaŭ en Valencio, dum la intercivitana milito (1936 - 1939) oni eldonis la gazeton "Popola Fronto", kaj Valencio estis kiu fondis en 1947 la "Hispana Esperanto Federacio"-n kaj grupigis denove la hispanan esperantistaron, disigita kaj malfortigita pro la civitana milito kaj la post-milito.



STRATO D-RO ZAMENHOF, VALENCIO

La historio de Esperanto en Valencio estas tre riĉa en anekdotoj kaj instruoj kiuj miksis lokecon kaj universalecon. Tia estis la Kongreso de SAT okazinta en Valencio en 1934, kiu spegulis la streĉitecon kaŭzita pro la rompo kun soveta esperantistaro kaj la nazia persekuto kaj disigo en Germanio.

Sed tiu etoso ankaŭ estis vigligita pro la urba agitiĝo. La Universitato malfermis sian pordon al la Kongreso, sed la solena malfermo estis ĉesigita de la polico.

En Municipa Biblioteko de la Placo de Maguncia oni gardas multegajn librojn kaj revuojn kiuj apartenis al la valenciaj grupoj disigitaj en 1939.

La libroj estis jam klasifikitaj kaj kodigitaj de nunaj esperantistoj kaj finfine antingeblaj de la publiko. Revuoj kaj ankaŭ tre grava kvanto da brajlaj skribaĵoj atendas venontan laboron per kiu oni povus rekonstrui nian esperantistan pasintecon.

En tombejo de Valencio oni povas legi sur memoriga plato: "Li semis kaj semis konstante". Pagita per internacia kvesto ĝi gardas la ripozon de Ludoviko Hernández kaj rememoras al ni lian ĉefan laboron por fidi al la estonteco.

## ARTA KAJ KULTURA PROGRAMO

- 1 Muzik-ensemblo "ANDA" (Pollando). 3 personoj kun propraj instrumentoj. Ili ludos danc-muzikon por Interkona Vespero kaj aliaj momentoj de la kongreso. Ankaŭ sur scenejo.
  - 2 "KORUSO DE MALNOVA KANTO DE PEDAGOGIA ALTLERNEJO DE BYDGOSZCZ" (Pollando). Ĉirkaŭ 40 personoj.
  - 3 Ensemblo "PLOMIENIE" (Flamo). Infana folkloro dancgrupo, 40 infanoj kun belegaj tipaj vestaĵoj, de la Palaco de la Junularo de Bydgoszcz (Pollando).
  - 4 Folklor-ensemblo "PALUKI", el Rogowo (Pollando). 6 personoj.
  - 5 Infana teatra grupo el Szubin (Pollando). 9 personoj. Spektaklo "ETA PRINCO".
  - 6 Junulara muzikkantgrupo el Vojevodio Kultur-Centro de Bydgoszcz (Pollando). Muziko de la 60-aj jaroj.
  - 7 Recitalo de Jadwiga Dziegielewska kun piana akompananto (Pollando).
  - 8 Arta programo de Ursula Tupajka "VERSAĴOJ DE JULIAN TUWIN POR INFANOJ" (playback) (Pollando).
  - 9 Muzik-grupo "ZAGRABA", 6 personoj, el urbo Nikolajev (Ukrainio). Elstaras la infan-kantistino Irina, 5-jara, kiu mirinde kantas en Esperanto.
  - 10 Folkloro muzik-ensemblo "ANIMO", (Latvio).
  - 11 Muzik-grupo el Rumanio.
- Eventuale ankaŭ partoprenos:
- 12 Muzik-grupo el Bulgario.
  - 13 La famaj artistoj Michael Bronstein kaj S-ino Puchova (Rusio).
  - 14 Eduardo Vargas "SOLO" (Hispanio).
  - 15 Teatro de la ensemblo de Angelina Sotirova (Bulgario).

## PRELEGOJ

- 1 Miguel Fernández (Hispanio): “SUR LA SPUROJ DE FEDERICO GARCIA LORCA”.
- 2 Gian Carlo Fighiera (Italio): “ESPERANTO PRETER LA JARO 2000 (LINGVO KAJ MOVADO)”.
- 3 Anton Zacharias (Slovakio): “INSTRUADO DE ESPERANTO LAŬ CSEH-METODO”.
- 4 Andrzej Grebowski (Pollando): “INTERNACIA ESPERANTO-TURISMO”, kun kolokvo.
- 5 Rafaela Urueña (Hispanio): “SUR LA VOJO AL UNUECA EŬROPO: PROBLEMOJ KAJ DEFIOJ”.
- 6 Milan Zvara (Slovakio): “MIKOLOGIO KAJ FUNGOKOLEKTADO EN CENTRA EŬROPO”, kun lumbildoj.
- 7 Antonio Alonso (Hispanio) gvidos: “DEBATO PRI LA LINGVOJ DE HISPANIO”-n.
- 8 Barbara Pietrzak, redaktoro de POLA RADIO (Pollando): “ESPERANTO EN RADIO”, kun debato.
- 9 Miguel Angel Sancho (Hispanio): “METODOLOGIOJ PRI MULTIMEDIA INFORMATIKO” (konfirmota).
- 10 Sigita Staisiunaite (Litovio): “YUMAIKO-TERAPIO: JAPANA TERAPI-MASAĜO”.
- 11 Jesús de las Heras (Hispanio): “LA MUZIKO DE FERNANDO SOR”, kun gitara helpo.
- 12 Augusto Casquero (Hispanio): “PILGRIMADO TRA LA VOJO DE SANKTA JAKOBO”, kun lumbildoj.
- 13 Literatura grupo “Ibere Libere”: “DE VALENCIO AL VALENCIO”.

## PRELEGANTOJ



**M<sup>a</sup> Rafaela Urueña Álvarez**  
Hispanio

Ŝi naskiĝis en Bilbao en 1942, kaj faris la bazan kaj mezgradan studojn en Valladolid, kie ankaŭ ŝi studis la juran karieron en la tiea Fakultato pri Juro, finante ĝin kun "eksterordinara premio". Ŝi doktoriĝis en 1979 post defendo de tezo pri Marjuro kaj atingante la plej altan gradon "Cum laude". Docentino pri Internacia Publika kaj Privata Juro en la Fakultato pri Juro de la Universitato de Valladolid de 1968 ĝis 1981, estas ĝis nun, post publika konkurso, Adjunkta

Profesoro pri Internacia Publika Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la sama Universitato. Ĉi tie ŝi gvidas la normalajn kaj doktorigajn kursojn. Specialiĝinta pri Marjuro kaj Spacjuro, nuntempe ege aktivas en la Komunuma Juro, gvidante diversajn tezojn pri temoj rilatantaj al la Eŭropa Unio, ene de la Katedro "Jean Monnet" pri Komunuma Juro, de Valladolid. En la esperantista sfero, ŝi agas ekde 1960, ekde kiam ŝi havis diversajn postenojn en la Grupo "Fido kaj Espero" de Valladolid, kaj ŝi posedas la titolon de Esperantista Instruisto de 1975. Prezidantino de Hispana Esperanto Federacio de 1978 ĝis 1985, ŝi ofte prelegis pri kaj en Esperanto en diversaj forumoj (Altlernejoj, Universitatoj ktp) kaj en pluraj Universalaj Kongresoj de Esperanto, ene de IKU (Internacia Kongresa Universitato) kie ŝi ofte prelegis pri juraj temoj. Ŝi verkis multajn artikolojn pri Juro en fakaj revuoj kaj libron titolita "La protektado de la marmedio en Hispanio", eldonita de la Univ. de Valladolid. Ankaŭ ŝi kutime verkas en Esperanto, artikolojn por Boletín de HEF, Monato, kaj aliaj revuoj. Membro de la Esperanta Jura Asocio, kies asocio ŝi prezidis, de la Internacia Akademio de Sciencoj de S. Marino, kaj de Hispana Esperanto-Federacio, aktive partoprenas ekde ĝia fondiĝo, en la agado de la Hispana Asocio de Profesoroj pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj.

### *Sur la vojo al unueca Eŭropo: problemoj kaj defioj*

Eŭropo signifas iom pli ol kontinento. Por eŭropano gravas senti sin ano de la sama historia sento, forĝita tra multaj okazintaĵoj, militoj, kunlaboroj kaj malkomprenoj. Pro tio estas grava afero ke ni konu niajn proprajn komunajn trajtojn.

La regionalismo en Eŭropo ekfloris post la dua mondmilito, sed la politikaj okazintaĵoj post tiu milito devigis la popolojn aparteni al du malsimilaj sferoj, kaj ili aniĝis en malsimilaj internaciaj organizoj.

Sed la eŭropa sento ne malaperis en neniu bloko, kaj iom post iom komencis la unuajn paŝojn al pli unueca Eŭropo per la Fina Akto de Helsinki aŭ per la aparteno, post ilia demokratiigo, al la Konsilio de Eŭropo de landoj de centro kaj orienta Eŭropo. Tio pruvas ke Eŭropo ne limiĝas nur per geografiaj kriterioj, sed per komuna sento de solidareco, respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, sen altrudi la proprajn kulturajn valorojn, ĉar nia diverseco riĉigas nin.

Nun oni frapas la pordon de la Eŭropa Unio multaj aliaj landoj. Ĉu ni estos kapablaj akcepti ilin sen ekonomiaj diskriminacioj, por forstreki por ĉiam la terura divido okazinta en Jalto?

## Ibere Libere


Pri la iberia grupo de esperantaj kultur-agantoj.

La spontane ŝprucintan opon *Iberia Grupo de Esperantaj Kultur-Agantoj* konsistigas poetoj, prozistoj, literatur-kritikistoj, muzikistoj ktp el diversaj partoj de la iberia duoninsulo, kies verkoj, kelkfoje kunlabore plenumataj, alstrebas nuntempigon de la E-kulturo. La grupo publike sin prezentis en 1993, kadre de la 78-a U.K. en Valencio, alportante al nia poezio la epopeon *Poemo de Utnoa* (A. Montagut) kaj la poemaron *Ibere libere* (G. Neves, J. Camacho, Liven Dek, M. Fernández), kaj al nia muziko la kantaton *La profil' de viaj spuroj* (P. Vilarroig, M. Fernández). Ĉi-okaze la alportoj de niaj iberianoj havas nur literaturan karakteron. A. Montagut prezentos sian libron *Karnavale*; M. Fernández, J. Camacho, G. Neves kaj Liven Dek, la kvaropan rakontaron *Ekstremoj*; M. Fernández, sian poemaron *El miaj sonoraj soloj*, kaj A. Valén disvolvos siajn starpunktojn pri la grupo.

## De Valencio al Valencio



**Miguel Fernández** naskiĝis en 1950 en Granada (Andaluzio, Hispanio), kie li bakalaŭriĝis kaj ricevis edukon pri solfeĝo kaj kanto-arto. En 1968 ekstudis ĉe la Politeknika Universitato de Madrido. Esperantistiĝis en 1981. Kunlaboras en pluraj revuoj kaj plurfoje estis premiita pro siaj verkoj. Publikigitaj libroj: 1) originalaj: *Ampoemaro (Ibere libere)* (poemkolekto), *El miaj sonoraj soloj* (poemkolekto), *Sur la spuroj de Federico García Lorca* (eseo); 2) tradukoj: *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba* ( teatraĵoj de F. G. Lorca), *La blua hundo* (novelo de Guillermo Osorio), *Poeto de l' popolo* (poem-antologio de Miguel Hernández).



**Jorge Camacho** naskita en Zafra, Hispanujo, en 1966. Eklernis esperanton en 1980. Plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA. Premio Grabowski en 1992, kaj membro de la Akademio de Esperanto de la sama jaro. De 1995 laboras en Bruselo kiel konferenca interpretisto de Eŭropa Unio, el la lingvoj angla kaj finna al la hispana. Ĉefaj verkoj: (traduke) "Astura bukedo" kaj "Letero el Palestino"; (originale) "Sur la linio", "Ibere libere", "La Majstro kaj Martinelli" kaj "La ĉapo de la sterko-vermo".



**Gonçalo Neves**, portugalo, naskita en 1964. Esperantistiĝis en 1987. Licenciito pri plantpatologio. Studis plurlingvan la francan, anglan kaj latinan lingvojn. Ekde 1995 li estas membro de la Akademio kaj lingva reviziisto de *Monato*. Li gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA, Internaciaj Floraj Ludoj kaj aliaj literaturaj konkursoj. Liaj poemoj kaj rakontoj aperis en diversaj gazetoj kaj revuoj, precipe en *Literatura Foiro* kaj *Fonto*. En 1993 liaj ĉefaj poemoj aperis en la komuna poemaro "Ibere libere" kaj lia novelaro en "Kompreno".



**Liven Dek**, naskiĝis en 1950 en Santander (Hispanio). Kemiisto. Eldonas la seriojn "Sferoj", "Orbito nula", "Future". Kunlaboras en pluraj revuoj kaj plurfoje gajnis premiojn en literaturaj konkursoj. Kontribuis al jenaj verkoj: (traduke) "Astura Bukedo", "La stultaj infanoj", "Sferoj (1, 2, 4, 5, 7, 9)"; (originale) "Ibere libere" (poemaro), "Sferoj (3, 6, 8)", "Trezoro", "Nova Esperanta Krestomatio".



**J. Abel Montagut i Masip** licenciĝis pri kataluna filologio en Studi General de Lleida (Barcelona Universitato). Li esperantigis, krom Ausias March, verkojn aŭ fragmentojn el Ramón Llull (*Libro de Amiko kaj Amato*), Salvador Espriu (*Taŭrofelio*), Pere Calders, k. a. Dufoje li premiĝis en nacilingvaj beletraj konkursoj pro katalunlingvaj rakontoj kaj poemoj, kaj en la 23-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Sabadell. 1983, pro traduko el la unua poemo de Ausias March. Li publikigis, originale en Esperanto, la libron *Poemo de Utnoa* (1993). En 1996 aperis *La gesta d'Utnoa*, katalunigo el la unua verko, kaj en 1997 *Karnavale, maskita*

*rakonto*, pri la konfliktoj inter imperiismaj kaj subpremataj lingvoj.



**Antonio Valén** esperantistiĝis en 1983. Okupiĝis pri diversaj agadoj (normalaj kaj rapidaj kursoj, ktp). Liaj ĉefaj nunaj agadoj estas: 1) kunordigado de la teamo de la Hispana-E-a vortaro de F. de Diego, kaj 2) reviziado kaj polurado de multegaj beletraj tekstoj kaj beletra kritiko en diversaj E-revuoj.





## Gian Carlo Fighiera Italio

Mallonge skizita, lia engaĝiĝo startis en 1947. En sia naskiĝurbo Torino, Italio, G. C. Fighiera (18-jara studento) agadis dum ok jaroj kiel disvastiganto de la lingvo, kursgvidanto, organizanto de amaskursoj, kunlaboranto de UEA por la Montevidea Unesko-kampanjo (1954) kaj fondinto de la informa fako de Itala E-Federacio, kies vic-prezidanto li fariĝis.

En 1955, Fighiera gvidis la gazetaran servon de UK en Bolonjo (Italio) kaj estis nomita KKS (Konstanta Kongresa Sekretario) de UEA. Dum 6 jaroj Fighiera deĵoris sinsekve po 11 monatoj en Kopenhago, Marsejlo, Majenco, Varsovio, Bruselo kaj Harrogate (Britio). En 1960 li edziĝis al Ada Sikorska, tiama redaktorino de la tutnovaj E-elsendoj de la Pola Radio. La paro inter si uzadis nur Esperanton dum 35 jaroj, nome ĝis la forpaso de Ada.

Li fondis la asocion "Heroldo de Esperanto", kiu daŭrigis la eldonon de la samnoma gazeto (fondita de Teo Jung en 1920) redaktatan de Ada. Fighiera prezidis la asocion kaj ekde 1962 helpis la edzinon dum 35 jaroj en la administra kaj redakta laboroj. En Bruselo Fighiera organizis la Antaŭkongreson de la Haga UK (1964) kaj aperigis serion da kritikaj artikoloj por plibonigi la mastrumadon kaj la agadon de la internacia movado. En Madrido, Fighiera (poste nomita direktoro de MTO por Eŭropo kaj Proksima Oriento) restadis 10 jarojn, dum kiuj li aktivadis en la hispana kaj madrida movadoj, i. a. kunlaborante en la preparo de naciaj kongresoj en Madrido kaj Valencio. Emeritiĝinte, Fighiera revenis al sia naskiĝurbo Torino, en 1988, kie li tuj eklaboris por E-o en la kadro de la loka grupo kaj kiel estrarano de la Fonduso Marelli; en 1993 li organizis la eksteran gazetaran servon de la Valenciana UK, eble la plej vastan en la tuta historio de la UK.

Nuntempe, Fighiera daŭre aktivas por E-o (en somero 1997 li gvidos kurson ĉe la Domparo kaj ĉefprelegos en la internacia E-kongreso en Valencio).

Lia edzino Ada Fighiera Sikorska mortis en 1996, rimarkinde, ke eĉ en la malsanuleja lito ŝi laboris por Esperanto. Post sia forpaso, Fighiera mem redaktis la lastajn kvar numerojn de 1996 de "Heroldo".

### ***Esperanto preter la jaro 2000 (lingvo kaj movado)***

En historia perspektivo Esperanto laŭiras du vojojn: la lingvo kaj la movado. La lingvo, nome la unua flanko de Esperanto, jam delonge stabiliĝis en sia gramatika kaj sintaksa aspektoj: aliflanke, pri leksiko pace kunvivas du tendencoj: skemismo kaj naturismo. La sekvantoj de la skemisma skolo asertas, ke la aglutina strukturo de la lingvo sufiĉas por riĉe esprimi ĉiajn pens-nuancojn kaj intelektajn konceptojn per limigita nombro de leksemoj. La alia skolo –naturisma– opinias, kontraŭe, ke sola aglutinado egalas al malriĉo de la lingvo: oni devas krei novajn memstarajn vortojn, ĉerpante ilin el la natur-trezoro de la naciaj lingvoj laŭ la principo de internacieco.

La dua historia vojo de Esperanto, la movado, celas la disvastigon de la internacia lingvo. Ankaŭ ĝi nutras –iom malpli pace ol en la unua kazo– du animojn:

finvenkismo kaj raŭmismo. La unua predikas la Zamenhofan doktrinon de lukto "ĝis la bela sonĝo de l'homaro por eterna ben' efektiviĝos", nome ĝis la fina enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn. Al tiu ĉi pensofluo opozicias la alia movada tendenco, kies manifesto (Raŭma, 1980) substrekas, ke vanas strebi al neatingebla fina venko: Esperanto peras kaj esprimas novan transnacion kulturon, signitan per toleremo kaj interkompreniĝo, portatan de diaspora socio, la esperantistaro. Do, ne movado, sed lingva komunumo.

Inter la nomitaj tendencoj primovadaj kreskas la ekumeneca propono de Tonkin, eble sekvata de la granda plejmulto de la movadanoj: finvenkismo kaj raŭmismo ne opozicias al si reciproke, sed kompletigas unu la alian.



## **Miguel A. Sancho Pardo** Hispanio

Naskiĝis en Madrido en 1963. Licenculo pri Filozofio, kursis doktoriĝ-programon pri Logiko kaj Artefarita Inteligento kaj komencis sian profesion karteron per la lernigado de Informatiko. En 1988, li eniris la Multimedian Departamenton de Indra SSI, kie li partoprenis, interalie, la desegnon kaj konstruon de la grafika prezento de la voĉdonrezultojn de la kvar lastaj balotoj en Hispanio kaj la publikigon de kelkaj tre konataj CD-ROM-aj volumoj. En la lastaj monatoj li kunfondis Spin Media, entrepreno celanta krei elstaran oferton pri Multimedio en Hispanio, kie li deĵoras kiel teknika respondeculo.

Tuj post lia esperantistiĝo en 1979, li aktive partoprenis la hispanan esperantan junularon kiel redaktoro de la tiama gazeto HEJS-Juneco kaj prezidanto de Hispana Esperantista Junulara Societo. Dum mallonga periodo li ankaŭ aktivis en Filozofia Asocio Tutmonda kaj Komputila Rondo. Nuntempe li respondecas pri la administrado de la paĝoj de HEF en Internet.

### ***Metodologioj pri multimedia informatiko***

Multimedio estas vorto vaste uzata sed nebone konata. Multimediaj sistemoj ĉirkaŭas nin kaj influas nian vivon. Neprofesiuloj ricevas tamen neklaran informon pri ili, tiel ke, pli kaj pli, ili ne komprenas la kernon de tute normalaj teknologioj: Internet, dĝita televido, CD-ROM, ktp.

Per du konataj ekzemplaj projektoj, la preleganto, kiu aktive partoprenis ilin, klopodos klarigi al neteknika publiko la esencon de tiaj sistemoj:

La konstruo de la plej granda sistemo de informado per Internet pri la lasta hispana Ĝenerala Balotado. Pli ol dek-mil paĝoj aŭtomate kreitaj informis al du milionoj de retanoj en la tuta mondo pri la reala evoluo de la kalkulo de la voĉdonoj.

La publikigo de Cinemedia, Enciklopedio pri Hispana Kinarto, eldonata de Canal +, estis ĝenerale akceptita kiel unu el plej elstaraj CD-ROM-aj volumoj iam eldonataj en Hispanio.

La nivelo de la prelego estos kiel eble plej neteknika kaj celos amuzan informadon.




## **Fernando de Diego**

Hispanio

### *Ĉu distre interesa?*

Literatura kaj esea tradukisto. Sia originala produktaĵo estas minimuma kompare kun la traduka laboro. Fernando de Diego estas iu kirurgo pri la vorto: la ekzakteco, la ĝusta frazo, la perfekteco kaj, ĉefe, la pureco, estas la trajtoj kiuj karakterizas tiun kiu eble estas la plej bona stilisto kaj la aŭtoro kun pli vasta vortprovizo el la E-literaturo. En siaj manoj, la lingvo akiras neoftan vigecon, ĉar Fernando de Diego posedas meriton kaj klarecon por funde ekspluati la eblecojn de Esperanto.

Oni akuzas lin esti tro neologismema. Eble tio estas certa, sed konvenas rememori ke Kalocsay, nun konsiderata kiel la plej bona E-literaturisto, estis forte kritikita dum la trideka jardeko por la sama motivo.



## **Milan Zvara**

Slovakio

### *Mikologio kaj fungokolektado en Centra Eŭropo*

Prezidanto de Orient-slovakia Esperanto Asocio, kaj Direktoro de la Esperanto Kultur-centro de Poprad. Inĝeniero pri Nutrado, mondkonata naturprotektanto, biologo, ekologisto, kaj speciale sperta pri la temo de tiu prelego. Li verkis diversajn librojn pri fungoj, kaj amason da artikoloj. Ĉiujare, en septembro, li gvidas en Poprad la Mikologian

Seminarion, al kiuj aliĝas homoj alvenintaj el malproksimaj landoj. Li prelegos kun akompano de belegaj lumbildoj pri fungoj kaj pri naturo en la belega regiono Altaj Tatroj.



## **Miguel Fernández Martín**

Hispanio

Li naskiĝis en 1950 en Granada (Andaluzio, Hispanio), kie li bakalaŭriĝis kaj ricevis edukon pri solfeĝo kaj kanto-arto. En 1968 ekstudis ĉe la Politeknika Universitato de Madrido. Esperantistiĝis en 1981. Kunlaboras en pluraj revuoj kaj plurfoje estis premiita pro siaj verkoj. Publikigitaj libroj: 1) originalaj: *Ampoemaro (Ibere libere)* (poemkolekto), *El miaj sonoraj soloj* (poemkolekto), *Sur la spuroj de Federico García Lorca* (eseo); 2) tradukoj: *Sanga nupto kaj*

*La domo de Bernarda Alba* ( teatraĵoj de F.G. Lorca), *Poeto de l' popolo* (poemantologio de Miguel Hernández), *La blua hundo* (novelo de Guillermo Osorio).

## **Sur la spuroj de Federico García Lorca**

Konsistas en pasia vojado tra la verkaro, vivo kaj morto de unu el la plej universalaj hispanaj verkistoj, direkte al la fontoj de lia senkompara kaj multifaceta inspiro. La prelego celas elmontri la buntan personecon de la poeto, lian magnetismon, lian artan proteismon, lian ĉefverkon: lin mem, kiel sintezon de ia denaske artisma spirito plus ia medio –Andaluzio, lia naskiĝregiono– plus ia epoko –la hispanaj dudekaj kaj tridekaj jaroj de la nuna jarcento–. La preleganto ilustras la portreton de Lorca per recitado de liaj poemoj –en propra traduko– kaj per kantado de tradiciaj hispanaj kanzonoj –de Lorca kolektitaj kaj harmonizitaj– kaj de aliaj kantoj, propraj al la andaluzaj folkloro –la t. n. *Cante Jondo* aŭ *Flamenco*–, kiuj inspiris al la universala poeto multajn el liaj versoj.



**Andrzej Grebowski**

Pollando

### ***Internacia Esperanto-turismo***

Nuntempa Prezidanto de Monda Turismo, prelegos kaj gvidos debaton pri la nuna situacio de turismo en la esperantistaj medioj, kaj de Esperanto en la turisma mondo.

De antaŭ multaj jaroj li strebas santepe propagandi Esperanton en la Turismaj medioj, pri kio li vere agas genie, kaj samtempe klopodas organizi turismajn aranĝojn por

neesperantistoj kun la celo partopreni esperantajn aranĝojn, kio pli bone ol simplaj vortoj helpas en la varbado de homoj por la movado.

De antaŭ multaj jaroj li organizas en Bydgoszcz (Pollando), nuna sidejo de Monda Turismo, Internaciaj Esperanto-Kursojn. Stud-ekzamenajn Sesiojn pri Turismo, “A” Seminariojn por Cseh-Instruantoj, Studumojn pri Turismo (kun akademia valoro) ktp.

Li eble estas la homo, ene de nia movado, kun plej granda kapablo por varbado kaj organizado, kaj certe li montros al ni kiel agi en ĉi tiu grava kampo.



**Anton Zacharias**

Slovakio

### ***Kurso de Esperanto laŭ Cseh-Metodo Instruado de Esperanto laŭ Cseh-Metodo***

Ĉiutage, dumkongrese, po du horoj, S-ro Anton Zacharias, el Košice (Slovakio), gvidos kurson por komencantoj laŭ la plej efika metodo, instrui la Internacian Lingvon, t. e. la “Cseh-Metodo”.

Anton Zacharias, tre konata en la internacia movado, gvidis tiajn kursojn dum tri jardekoj, kaj en Slovakio, kaj en diversaj eŭropaj landoj. Speciale popularaj estas la "Somera Esperanto-Lernejo"-j, kiuj ĉiusemere okazas en Poprad (Slovakio), al kiuj aliĝas lernantoj de la tuta mondo.

Krom la kurso, S-ro Zacharias prelegos kaj gvidos debaton pri la instruado de la Internacia Lingvo, ĉefe orientita al profesoroj de E-o.



## **Barbara Pietrzak**

Pollando

### ***Esperanto en radio***

Jam en la infanĝo mi eksciis pri la ideo de la Internacia Lingvo, pri kio ni interesiĝis kune kun la gefratoj. Tamen la lingvon mi ellernis kiel dekelkjara skoltino, pro la hazarda renkonto de la jam tiam konata varsovia esperantisto, Roman Dobrzynski, kio permesis al mi partopreni eĉ la Infanan Kongreseton de la varsovia UK 1959. Cetere dank al li mi ankaŭ en pli posta periodo aktivis en la pola junulara E-movado, ia kunredaktante la sekcian periodaĵon "Tamen" (iom pli poste dum kelka tempo mi redaktis "Pola Esperantisto"). Post la morto de mia edzo, konata pola E-aganto Marek Pietrzak (ĝenerala sekretario de TEJO) mi komencis la laboron en la E-redakcio de Pola Radio (1968). En la daŭro de tiuj multaj jaroj mi plurfoje estis raportistino de diversaj esperantistaj aranĝoj, inkluzive de kelkaj UK-oj, mi gvidas la tn. Kontaktomagazinon pri la internacia E-movado "Esperanto ekspreso"; krom esperantotemoj en la programo de la E-elsendoj de Varsovio mi kiel radia ĵurnalistino respondecas pro temoj ligitaj kun vaste komprenata soci-familia problemaro, sciencteknikaj malkovroj, kulturo. De du jaroj mi estas la prezidantino de la Pola IKUE-sekcio, la Prezidantino de la Plenumkomitato de IKUE. Lige kun ĉi tiu agado mi eldonas la sekcian "Bultenon" kaj organizas fakajn kunvenojn




## **Eduardo Vargas Gutiérrez**

Hispanio

Solo. Solotronik, naskiĝis je kelkaj jardekoj, muzikisto el 1980, li teatris, radiis kaj fine muzikis, li studis en Konservatorio, li estis finalisto en nacia konkurso pri sinfona orkestrado. En 1990 li konis E-on, li tuj komencis paroli kaj kanti en nia lingvo, la Andaluzo Asocio kaj Solo eldonis lian unuan albumon en lia vivo, laste li gajnis premion de Sinfonika Komisiono el S.G.A.E., li partoprenis en internacian kompilaĵon kun aliaj artistoj. Gravaj koncertoj: 1988

Barcelono, 1990 HEF-K, S. Cugat, 1991 Taragono, 1992 Turneton tra Francio: Limoges, Rodez, Bordeaux, Montpellier, Toulouse, ktp, HEF-K en Mérida, 1993 U.K. Valencio, Festivalo en Paris, 1994 HEF-K en Málaga, 1996 HEF-K en Murcia.

# ESPERANTA ITINERO



1. Sidejo Valencia Esperanto-Grupo
2. Strato D-ro. Zamenhof
3. Biblioteko Placo Maguncia
4. Strato Esperantista Luis Hernández
5. Kongresejo
6. Escuelas Pías
7. Tombejo

# HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1-a 1920	Barcelono	41-a 1981	Murcio
2-a 1921	Zaragoza	42-a 1982	Málaga
3-a 1923	VALENCIO	43-a 1983	Zaragoza
4-a 1924	Bilbao	44-a 1984	Seviljo
5-a 1925	Kordovo	45-a 1985	Kartageno
6-a 1926	Madrido	46-a 1986	Vigo
7-a 1928	Seviljo	47-a 1987	Madrido
8-a 1929	Oviedo	48-a 1988	VALENCIO
9-a 1932	Madrido	49-a 1989	Bilbao
10-a 1933	Santander	50-a 1990	Sant Cugat
11-a 1936	Barcelono	51-a 1991	La Laguna
12-a 1951	Tarrasa	52-a 1992	Mérida
13-a 1952	VALENCIO	53-a 1994	Málaga
14-a 1953	Bilbao	54-a 1995	Salou
15-a 1954	Zaragoza	55-a 1996	Murcia
16-a 1955	Gijón	56-a 1997	VALENCIO
17-a 1956	Barcelono		
18-a 1957	Madrido		
19-a 1958	CASTELLON		
20-a 1959	Málaga		
21-a 1960	Pontevedra		
22-a 1961	Majorko		
23-a 1962	Valladolid		
24-a 1963	Barcelono		
25-a 1964	VALENCIO		
26-a 1965	Palencia		
27-a 1966	Bilbao		
28-a 1967	Zaragoza		
29-a 1969	La Laguna		
30-a 1970	Mieres		
31-a 1971	ALICANTE		
32-a 1972	Vigo		
33-a 1973	Madrido		
34-a 1974	Valladolid		
35-a 1975	Lérida		
36-a 1976	El Ferrol		
37-a 1977	Sabadell		
38-a 1978	León		
39-a 1979	Gijón		
40-a 1980	Madrido		



KONGRESEJO

# NOTOJ



## **VALENCIA ESPERANTO-GRUPO**

G.V. Fernando el Católico, 45 - 3<sup>a</sup>  
46008 Valencia (Hispanio)  
Telefono kaj telefakso:  
\* 34 (9) 6 384 96 16